

## Enhavo

1	El bibliotekoj kaj arkivoj .....	2
1.1	En Munkeno: Ekspozicio, simpozio kaj faklibro pri planlingvoj .....	2
1.1.1	La okazo .....	2
1.1.2	La ekspozicio.....	2
1.1.3	La simpozio .....	3
1.1.4	La simpozia libro.....	3
1.1.5	Informado .....	4
1.2	En Berlin: Esperantistoj en la <i>Federacia Arkivo de Germanio</i> .....	4
1.3	Esperanto en la <i>Fritz-Hüser-Instituto Dortmund</i> .....	5
1.4	La arkivo de la idisto <i>Andreas Juste</i> en Vieno.....	5
1.5	Diskutado pri bibliotekoj.....	6
2	Lingvopolitiko.....	6
2.1	Simpozio pri lingvoj ĉe <i>Unuiĝintaj Nacioj</i> .....	6
2.2	<i>Philippe van Parijs</i> pri lingva justeco en Eŭropo kaj la mondo.....	8
3	El universitatoj .....	10
3.1	Universitata laboraĵo el Danio.....	10
3.2	Lingvoplanado kaj Planlingvoj ĉe la Universitato de Torino.....	10
3.3	Promociado de <i>prof. LIU Haitao</i> .....	11
4	Progresoj de UEA en la terminologia mondo.....	11
5	Persona bibliografio de <i>Věra Barandovská-Frank</i> .....	11
5.1	Biografieto.....	11
5.2	Publikaĵoj.....	12
6	Nova prezidanto de <i>Esperanto Studies Foundation (ESF)</i> .....	16



# 1 El bibliotekoj kaj arkivoj

## 1.1 En Munkeno: Ekspozicio, simpozio kaj faklibro pri planlingvoj

### 1.1.1 La okazo

Sendube unika interlingvistika evento okazis meze de junio 2012 en Munkeno (München), la ĉefurbo de la germana federacia ŝtato Bavario: interlingvistika ekspozicio, simpozio kaj aperigo de faklibro. Pri kio temas?

En 1887 en Munkeno okazis la 2-a internacia kongreso de volapukistoj. Inter la invititaj gastoj ankaŭ troviĝis la “Reĝa Kortuma kaj Ŝtata Biblioteko de Bavario”. Post sia dissolviĝo la volapuka klubo de Munkeno donacis al la Reĝa Biblioteko siajn materialojn, inter ili ankaŭ prikongresajn dokumentojn.

La hodiaŭa Bavara Ŝtata Biblioteko, (Bayerische Staatsbibliothek, BSB, Ludwigstraße 16, 80540 München) posedas krom volapukaĵoj multajn aliajn materialojn pri planlingvoj, aparte, kompreneble, pri Esperanto.

Do, en la biblioteko jam troviĝis nemal multe da materialo pri planlingvoj kaj ekzistas videbla intereso flanke de biblioteko pri la temaro kaj kompreno pri ties scienca valoro.

Verŝajne ankaŭ la Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL) iom helpis pri tio. Ĝi regule al BSB sendadis siajn materialojn. GIL ankaŭ organizis, ke BSB regule ricevu la eldonojn de Ipl.

Tamen, aparte gravas, ke *Irimi* kaj *Reinhard Haupenthal* sukcesis subskribi kontrakton kun BSB pri la transdono al ĝi de ilia ege riĉa planlingva kolekto, en kiu troviĝas multaj volapukaĵoj. La subskribo de la kontrakto okazis la 20-an de novembro 2006. Krom tio menciindas aldona interesa fakto: *Hanns Martin Schleyer* (1915-1977), la prezidinto de la Ligo de Labordonantoj (Arbeitgeberverband), 1973 bis 1977, kaj prezidinto de la Germana Ligo de Industrio (Bundesverband der Deutschen Industrie, 1977), kiu, kiel konate, estis murdita<sup>1</sup>, estis pranevo de la inventinto de Volapük, prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912) kaj heredis parton de ties postlasaĵo. La filoj de la murdito en 2010 transdonis sian parton de la volapük-rilata heredaĵo de la prelato al BSB. Tiel la materialoj el la kolektoj de Haupenthal kaj Schleyer kuniĝis.

La 100-a datreveno de la morto de la inventinto de Volapük do estis taŭga okazo por informi pri Volapük kaj ties inventinto. Aldoniĝas la 125-a datreveno de la publikigo de la Unua Libro de Esperanto en 1887. Do, du gravaj datrevenoj por atentigi pri planlingvoj.

### 1.1.2 La ekspozicio

Okaze de ambaŭ datrevenoj BSB aranĝis impresan ekspozicion kun la titolo “Inter utopio kaj realo: konstruitaj lingvoj por la globalizita mondo”. La ekspozicion, en ĉeesto de pli ol 100 personoj, inter ili *Jörg Schleyer* kaj *Thiele Wüster*, la 14-an de junio 2012 malfermis la ĝenerala direktoro de BSB, *d-ro Rolf Griebel*.

*Reinhard Haupenthal* prezentis enkondukan prelegon pri la temo “Kio estas kaj kial oni studas interlingvistikon?” La biblioteka koruso prezentis kantojn en Volapük kaj Esperanto. La ekspozicio funkcias de la 14-a de junio ĝis la 9-a de septembro 2012 (lunde ĝis vendrede 10.00h-17.00 h, ĵaŭde 10.00h-19.00h, sabate kaj dimanĉe 13.00h ĝis 17.00h).

Oni montras 18 bonege aranĝitajn vitrinojn pri jenaj temoj:

- Lingvoprojektoj en la 17-a jarcento
- Skribataj lingvoj (= pazigrafioj) por tutmonda komunikado

---

<sup>1</sup> Li estis murdita en 1977 de anoj de la germana RAF (Rote Armee-Fraktion, la terorisma grupo Ruĝa Armea Frakcio).

- Filozofie bazitaj lingvoj
- Planlingvoj
- Prelato Johann Martin Schleyer
- Schleyer: aŭtoro de Volapük
- Gramatiko de Volapük
- Volapük: Societoj kaj asocioj
- Siatempaj debatoj pri la temo de monda helplingvo
- Zamenhof: Aŭtoro de Esperanto
- Universalaj Kongresoj de Esperanto
- La 4-a Universala Kongreso de Esperanto 1908 (Dresdeno)
- Vortaroj de Esperanto
- Originala literaturo en Esperanto
- Gramatiko de Esperanto
- Esperanto kaj tradukado
- La parkurbo Esperanto en Gräfelfing
- Esperanto en Interreto

La ekspozicion pretigis *d-rino Andrea Pia Kölbl* kaj *Jennifer Bretz*. Ĝi estas rete rigardebla: <http://www.bsb-muenchen.de/Einzeldarstellung.403+M562baccbf1d.0.html>

### 1.1.3 La simpozio

Vendredon, la 15-an de junio, okazis tuttaga simpozio kun jenaj prelegoj:

Reinhard Hauptenthal: *Johann Martin Schleyer und seine Plansprache Volapük*  
(Johann Martin Schleyer kaj lia planlingvo Volapük)

D-ro Ulrich Lins: *Die ersten hundert Jahre des Esperanto*  
(La unuaj cent jaroj de Esperanto)

Prof. d-ro Gerhard F. Strasser: *Konstruierte Sprachen im Wandel der Zeit: Von Hildegard von Bingens Entwurf einer religiösen Sprache zu Sudres ‚Langue musicale universelle‘*  
(Konstruitaj lingvoj dum la paso de la tempo: De la religia lingvo, skizita de Hildegardis von Bingen ĝis la ‚langue musicale universelle‘ de Sudre)

Prof. d-ro Heiner Eichner: *Konstruierte Intersprachen: Herausforderung und Chance für die Sprachwissenschaft?*  
(Konstruitaj interlingvoj: defio kaj ŝanco por la lingvoscienco?)

Herbert Mayer: *Die Sammlung Plansprachen der Österreichischen Nationalbibliothek: Geschichte und Gegenwart*  
(La Kolekto Planlingvoj en la Aŭstria Nacia Biblioteko: Historio kaj nun)

### 1.1.4 La simpozia libro

Okaze de la simpozio aperis jena libro:

Kölbl, Andrea Pia / Bretz, Jennifer (2012, Red.): *Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt. Begleitband zur Ausstellung an der Bayerischen Staatsbibliothek (14. Juni bis 9. September 2012)*. (Bayerische Staatsbibliothek. Ausstellungskataloge. 85). München: Allitera, 228 p., ISBN 978-3-86906-310-2, 19 €.

La libro, presita en bonega kvalito, entenas krom la supre menciitaj prelegoj (p. 11-163) jenajn aldonojn:

Rolf Griebel: *Vorwort* (Prefaco, p. 7-10)

Reinhard Haupenthal: *Was ist und zu welchem Zweck betreibt man Interlinguistik?* (Kio estas interlingvistiko kaj kiucele oni okupiĝas pri ĝi? p. 11-32)<sup>2</sup>

Irimi kaj Reinhard Haupenthal: *Auswahlbibliographie zur Interlinguistik und Esperantologie* (Elekta bibliografio pri interlingvistiko kaj esperantologio, p.165-198)

Exponate der Ausstellung: eine exemplarische Auswahl (eksponaĵoj: elekto de ekzemploj, entute 33 koloraj pecoj, p. 199-223)

Die Autoren (la aŭtoroj, p. 225)

Danksagungen (dankoj, p. 227-228)

### 1.1.5 Informado

Per prospektoj, artikoloj kaj en la reto oni relative bone informadis pri la ekspozicio kaj la simpozio (ankaŭ vidu *Ipl* 78/79, p. 21; *Interlinguistische Informationen* [IntI] 80, p. 15).

En *Bibliotheks-Magazin. Mitteilungen aus den Staatsbibliotheken in Berlin und München*, la komuna eldonaĵo de BSB kaj "Staatsbibliothek zu Berlin. Preußischer Kulturbesitz", en la kajero 1/2012 aperis du bone ilustritaj artikoloj de *Andrea Pia Kölbl*: „Die Sammlung Haupenthal. Eine Bestandserweiterung der Bayerischen Staatsbibliothek im Themenbereich ‚Plansprachen und Interlinguistik‘“ (p. 27-29) kaj „Volapük und mehr. Die Prälat-Schleyer-Bibliothek geht als Schenkung an die Bayerische Staatsbibliothek“ (p. 29-31).

(Traduko de la titoloj: „La kolekto Haupenthal. Plivastigo de la stoko pri la temaro ‚planlingvoj kaj interlingvistiko‘“; „Volapuko kaj pli. La prelato-Schleyer-biblioteko kiel donaco aldoniĝas al la Bavara Ŝtata Biblioteko“).

## 1.2 En Berlin: Esperantistoj en la *Federacia Arkivo de Germanio*

En la ŝtata Federacia Arkivo der Germanio (Bundesarchiv, kun la ĉefa sidejo en Koblenz) ekde la ekzisto de Esperanto troviĝas diversaj aktoj kun rilatoj al la lingvo de Zamenhof kaj ĝia movado. Post la germana unuiĝo la aktoj de la partioj kaj amasorganizaĵoj de GDR estis transprenitaj de la Arkivo. Por tiu celo oni kreis la apartan Fondaĵon Arkivo de Partioj kaj Amasorganizaĵoj de GDR (Stiftung Archiv der Parteien und Massen-Organisationen der DDR, SAPMO), kiu troviĝas en Berlin. Al la aktoj de GDR ankaŭ apartenas tiuj de la amasorganizaĵo Kulturligo (ĉ. 200 000 membroj), sub kies tegmento ekde 1965-1990 agadis la esperantistoj de GDR (maksimume ĉ. 2000 membroj). En SAPMO troviĝas la kompletaj aktoj de GDREA (iom post iom enretigitaj), ankaŭ ties ordigita biblioteko (ĉ. 2200 libroj kaj revuoj) kun katalogo

([http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b\\_esperanto/index.htm](http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b_esperanto/index.htm)). Krom tio SAPMO enhavas diversajn personajn postlasaĵojn de iamaj germanaj laboristaj esperantistoj (i.a. de *Otto Bäßler* kaj *Ludwig Schödl*) kaj de aliaj gravaj personoj kiel ekz. *Ino Kolbe* el Leipzig,

<sup>2</sup> La teksto baziĝas je la malferma prelego al la ekspozicio. Laŭ ĝi 'interlingvistiko' estas la scienco pri planlingvoj (kaj planlingvaj projektoj). Sed tiu koncepto, kvankam certgrade tradicia, en la moderna fakliteraturo tute ne plu estas la sola, eĉ ne la plej influa. La aŭtoro komplete ignoras la diversajn aliajn konceptojn pri la objekto de interlingvistiko, kvankam la ĉi-rilatan fakan literaturon li devus koni.

filino de la fondinto de Germana Laborista Esperanto-Asocio. En la Arkivo ankaŭ trovis lokon la postlasaĵo de la [orient]germana tradukisto *Karl Schulze* el Berlin (de li i.a. aperis tradukoj de *Fausto I+II* de Goethe, *Nackt unter Wölfen* de Apitz *Trigroŝa Romano* de Brecht kaj *Lotte en Weimar* de Thomas Mann).

SAPMO ankaŭ transprenos la sciencan arkivon de *Wera* kaj *Detlev Blanke* (partojn jam transprenis), laŭ kontrakto subskribita en 2005. Tiel postaj generacioj havos riĉan materialon por esploroj.

Okaze de la 125jara ekzisto de Esperanto SAPMO havis la ideon, inviti esperantistojn al faka gvidado tra la Arkivo en Berlin.

Partoprenis entute 28 personoj el Berlin kaj ekster ĝi, kiuj surbaze de kompetentaj informoj de *Brigitte Fischer*, *Grit Ulrich* kaj *Hans-Jürgen Voß*, kunlaborantoj de la Arkivo, ne nur konatiĝis kun la strukturo kaj uzebleco de la Arkivo, sed ankaŭ povis rigardi aparte preparitan ekspozicieton kun esperantaj libroj, revuoj kaj revuoj el la arkiva biblioteko kaj kun originalaj dokumentoj el la historio de Esperanto el GDR, aparte de GDREA.

### 1.3 Esperanto en la *Fritz-Hüser-Instituto Dortmund*

En la sudokcidenta germana urbo Dortmund (industria Ruhr-regiono) troviĝas en Eŭropo unika instituto, kiu kolektas materialojn de la laborista kultura movado (literaturo, muziko, pentraĵoj, fotoj, flagoj, insignoj, diversaj dokumentoj, personaj postlasaĵoj kaj aliaj materialoj). Ĝi nomiĝas “Fritz-Hüser-Instituto” (Hüser = pron. Hizer) laŭ la nomo de la fondinto, la ministro *Fritz Hüser* (1908-1979).

La Instituto ankaŭ disponas pri valora Esperanto-sekcio. La ĉefan materialon (libroj kaj arkivaĵoj) donacis la laborista esperantisto *Eduard Weichmann* (1919-1988). Aliaj donacintoj aldonis diversajn aliajn materialojn. La kolekton honorofice priservas la ĉefa esperantisto, loĝanta en Dortmund, inĝ. *Jiří Proskovec*, ĉar la profesiaj laborantoj de la Instituto ne scipovas Esperanton. Okaze de la 125jariĝo de Esperanto kaj iniciate de la direktorino de la Instituto, *Hanneliese Palm*, subtenata de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj Societo pri Interlingvistiko (GIL), la 30-an de junio 2012 en Dortmund okazis kolokvo sub la titolo

#### “Kolekti kaj konservi – Esperanto en la Fritz-Hüser-Instituto Dortmund”.

La kolokvon partoprenis 20 personoj el diversaj regionoj de Germanio.

Oni prezentis jenajn prelegojn:

Hanneliese Palm:	<i>La Fritz-Hüser-Instituto – taskoj kaj situacio</i>
Detlev Blanke:	<i>Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj en Eŭropo</i>
Ulrich Lins:	<i>Esperanto inter la ideologioj</i>
Andreas Diemel:	<i>Statuso kaj perspektivoj de la germana Esperanto-movado</i>

Post la prelego-parto okazis gvidado tra la Instituto. Eblis konatiĝi kun interesaj dokumentoj kaj surloke iom esplori. Oni planas kompili katalogon de la materialo en kaj pri Esperanto kaj ĉion meti en la reton. Pri la kolokvo oni i.a informis en la reto kaj en la loka gazetaro:

[http://www.dortmund.de/de/leben\\_in\\_dortmund/nachrichtenportal/nachricht.jsp?nid=189186](http://www.dortmund.de/de/leben_in_dortmund/nachrichtenportal/nachricht.jsp?nid=189186)

### 1.4 La arkivo de la idisto *Andreas Juste* en Vieno

Antaŭ kelkaj jardekoj la konata idisto kaj literaturisto (en Ido) *Andreas Juste* (1918-1998) starigis Ido-fondaĵon por savi gravajn materialojn, inkluzive siajn proprajn.

La tuta heredaĵo antaŭ nelonge estis transdonita al la Planlingva Kolekto de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Jen la aliro al la materialo:

<http://www.knowhowsphere.net/Main.aspx?BASEID=JANDCOIDO>

Legantoj de Ipl sendube povos kompreni tekston en Ido, kiun ni prezentas pri *Andreas Juste*:

## **Andreas Juste**

*Andreas Juste* (1918 - 1998 ) esis advokato en Charleroi, Belgia. Il deskovris Ido-linguo ed adheris ad ol entuziasmoze cirkum la fino di la jaro 1940. De lore til sua morto, il praktikis Ido pasionoze. Il konsideris Ido kom sua ekspreso-linguo por la ideoj e sentimentoj; ol esis vere lua linguo di kreado. Il produktis enorma e valoroza verkaro en Ido-linguo: originala poemoj, odi e kantoj poeziala, esajoj en la linguala ed interlingvistika domeno, originala fabloj, divulgovorko por France-parolantoj ed anke tradukoj de magna Europa poetoj.

Pluse, il redaktis granda nombro de sempre interesanta artikoloj por la centrala revuo di Ido, nome „Progreso” ed aliaj publikigadoj. Danke profunda studo di la konstituciaj tekstoj da nia pioniroj, e speciale da Louis Couturat, il divenis eksperto pri Ido-linguo, e liaj opinioj esis sempre bonvenanta.

*Juste Yolande*

## **1.5 Diskutado pri bibliotekoj**

Ĉar pli kaj pli sentiĝas la bezono de kunlaboro inter esperantaj bibliotekoj kaj bibliotekistoj, je la iniciato de la belga esperantisto *Roland Rotsaert* antaŭ iom da tempo kreiĝis la diskutgrupo [bibliotekoj@googlegroups.com](mailto:bibliotekoj@googlegroups.com) .

Pri la rezultoj de la diskutoj i.a. informas: <http://groups.google.com/group/bibliotekoj/topics> .

## **2 Lingvopolitiko**

### **2.1 Simpozio pri lingvoj ĉe *Unuiĝintaj Nacioj***

La unuan de majo 2012 en Novjorko UEA kune kun la “Office of Conference Services” de UN (la traduka kaj interpreta servo de UN) organizis lingvopolitikan konferencon.

Jam en la pasinteco UEA kunorganizis lingvopolitikajn konferencojn kun partneroj el la UN-sistemo. Ni mencias la siatempe traktitajn temojn:

- Languages in International Organizations (Lingvoj en internaciaj organizaĵoj), 1995
- Language and Culture in International Organizations (Lingvo kaj kulturo en internaciaj organizaĵoj), 1987
- The Economics of Language Use (La ekonomio de lingvo-uzo), 1986
- Overcoming Language Barriers: The Human/Machine Relationship (Superi lingvajn barojn: la rilato inter homo kaj maŝino), 1985
- Language Planning at the International Level (Lingvo-planado sur internacia ebenaĵo), 1984
- Language Behavior in International Organizations (Lingvaj kondutoj en internaciaj organizaĵoj), 1983

Aperis la aktoj de tiuj konferencoj.

Al la ĉefaj organizintoj de la konferencoj ĉiam apartenis *prof. Humphrey Tonkin*. Tio ankaŭ validas por la aktuala (ĉi-jara) konferenco. Ni listigas la prezentitajn prelegojn en la angla originalo<sup>3</sup>:

---

<sup>3</sup> Ni indikas la anglan originalon pro jenaj kialoj: a) Interlingvistike vere interesitaj legantoj de Ipl ĝenerale komprenas la anglan tiom, ke ili povas almenaŭ kompreni tekstojn. b) Por citi el gravaj anglaj konferencoj kaj dokumentoj oni ĉiam uzu la anglan originalon.

## **La konferenco havis jenajn partojn:**

### **Language Policy at the United Nations (Lingva politiko ĉe UN)**

- Françoise Cestac, Former UN Assistant Secretary-General. Introduction (Enkonduko).
- Marie-Josée de Saint Robert, Chief, Languages Service, Division of Conference Management, UN Geneva, “Policy Regarding Language Use at the United Nations.” Paper read by Bonnibeth Fonseca-Greber. (La politiko pri lingvo-uzo ĉe UN)
- André Corrêa d’Almeida & G. Bahar Otcu, Columbia University, “The Portuguese Language in the United Nations” (La portugala lingvo ĉe UN)

### **The Language Policy Background and Its Implications (1) (La lingvo-politika fono kaj ĝiaj implikiĝoj, 1)**

- Clément Mbom, Brooklyn College, “Langues et développement humain: Le français, acteur du développement dans les pays où il n’est pas la langue maternelle” (Lingvoj kaj homa evoluo: la franca kiel evoluiga faktoro en tiuj landoj, kie ĝi ne estas gepatra lingvo)
- Anna Luisa Daigneault, Living Tongues Institute for Endangered Languages, “The Endangered Languages of South America: Grassroots Language Activism and New Media for the 21st Century” (La endanĝerigitaj lingvoj de Suda Ameriko: desuba (popolbaza) lingva aktivado kaj la novaj komunikiloj de la 21-a jarcento)
- Lauren Zentz, University of Arizona, “Legacies of Modernity, Postcoloniality, and Globalization: Language Policy in Indonesia” (Heredaĵo de moderneco, postkoloniismo kaj tutmondiĝo: lingva politiko en Indonezio)

### **Film-prezento**

“Languages Lost and Found: Speaking and Whistling the Mamma Tongue” (Lingvoj perditaj kaj retrovitaj: parolante kaj fajfante la patrinan lingvon).

Iris Brooks and Jon H. Davis, Cultural Reporters / Film Directors, Northern Lights Studio

### **The Language Policy Background and Its Implications (2) (La lingvo-politika fono kaj ĝiaj implikiĝoj, 2)**

- Timothy Reagan, Central Connecticut State University, “But What Is My Mother Tongue: Rethinking the Challenges of Mother Tongue Education” (Sed kio estas mia gepatra lingvo: rekonsideri la defiojn de la gepatralingva edukado)
- Myriam de Beaulieu, United Nations, “Loss of lexical and cultural diversity with global communication” (Perdo de leksika kaj kultura diverseco per tutmonda komunikado)

- **Panel discussion** by the speakers in the morning and early afternoon sessions (Podia diskuto kun la ĝistiamaj prelegantoj)

### **Language Teaching and Learning (Instruado kaj lernado de lingvoj)**

- Bonnibeth Fonseca-Greber, University of Louisville, “Preparing the UN’s Next Generation: A Professional Development Plan for Translator Candidates” (Preparante la sekvan generacion de UN: plano por la profesia evoluigo de tradukistaj kandidatoj)
- Miriam Eisenstein Ebsworth & Brianna Avenia-Tapper, New York University, Steinhardt: Patricia Duffy, UN Language and Communications Programme; Jill Kalotay, webmaster and consultant, “Learning English for Peace: An Online English Course about the UN” (Lerni la anglan por paco: interreta kurso pri UN)
- Sohair Soukkary, Baruch College, CUNY, “Language Teaching: Tapping the Right Side of the Brain” (Lingvo-instruado: aktivigi la dekstran parton de la cerbo)

## **The NGO Experience (La sperto de neregistaraj organizaĵoj)**

Presentations by the Legion of Goodwill (Danilo Parmegiani) & Universal Esperanto Association (Steven Brewer) (Prezentoj de Legio de Bona Volo kaj UEA)

### **Closing Remarks (Konkludaj rimarkoj)**

- Humphrey Tonkin, University of Hartford, “Thirty Years of Church Center Conferences on Language at the UN” (Tridek jaroj da Church-Center-konferencoj pri lingvoj ĉe UN)
- Closing Remarks: Françoise Cestac

Vidu pli detale pri la konferenco, i.a. ankaŭ pri ties ĝenerala temaro:

<http://www.esperanto-un.org/languages-and-the-un.html>

## **2.2 Van Parijs pri lingva justeco en Eŭropo kaj la mondo**

*Van Parijs, Philippe (2011): Linguistic Justice for Europe & for the World. Oxford: University Press, 299 p., ISBN 978-0-19-920887-6*

Jen la enhavo:

### INTRODUCTION

#### 1. LINGUA FRANCA

- 1.1 Europe's lingua franca
- 1.2 A global lingua franca?
- 1.3 Probability-driven language learning
- 1.4 Maxi-min language use
- 1.5 The maxi-min dynamics
- 1.6 Deviation from maxi-min: didactic and symbolic
- 1.7 Maxi-min dynamics and power relationships
- 1.8 Power and the rise of English
- 1.9 Lingua franca and justificatory community
- 1.10 Lingua franca and trans-national demos
- 1.11 A vector of ideological domination?
- 1.12 Go English?

Appendix: three alternatives to lingua franca convergence

- 1. Babel Fish
- 2. Esperanto
  - (a) Neutrality
  - (b) Simplicity
- 3. Lingua franca pluralism
  - (a) Disjunctive plural regime
  - (b) Conjunctive plural regime

#### 2. LINGUISTIC JUSTICE AS FAIR COOPERATION

- 2.1 Anglophones as free riders
- 2.2 Indefinite learning versus one-off conversion



- 2.3 A stylized picture
- 2.4 Efficient cost sharing: Church and King
- 2.5 Equal cost sharing: Pool
- 2.6 Equal benefit sharing: Gauthier
- 2.7 Equal ratio of cost to benefit: Homans
- 2.8 Why the small may subsidize the big
- 2.9 Estimating the cost of language learning
- 2.10 Real-life approximations
- 2.11 A linguistic tax?
- 2.12 Compensatory poaching?

## Appendix

- 1. Formal expression of the four criteria of fair cooperation in the case of two linguistic communities
- 2. Equal cost-benefit ratios with many linguistic communities

## 3. LINGUISTIC JUSTICE AS EQUAL OPPORTUNITY

- 3.1 Liberal-egalitarian justice
- 3.2 Language, religion, and rights
- 3.3 Language-based inequality of opportunities
- 3.4 Tinkering with the language regime
- 3.5 Transfers to the linguistically handicapped
- 3.6 Dissemination through immersion schooling
- 3.7 An inexpensive instrument of dissemination
- 3.8 A ban on dubbing?
- 3.9 Disadvantage reversed?

## 4. LINGUISTIC JUSTICE AS PARITY OF ESTEEM

- 4.1 Equal respect
- 4.2 All languages on the same symbolic footing
- 4.3 Piggy-backing on the instrumental function
- 4.4 Who should pay for costly symbols?
- 4.5 Downsized plurilingualism
- 4.6 Rhetoric and exhortation

## 5. LINGUISTIC TERRITORIALITY

- 5.1 A territorially differentiated coercive regime
- 5.2 Non-starters: right of the soil and national sovereign
- 5.3 First argument: colonial attitude
- 5.4 Second argument: kindness-driven agony
- 5.5 Third argument: every tongue a queen
- 5.6 Territorial reciprocity
- 5.7 Pacification through territoriality?
- 5.8 Territoriality versus heterogeneity
- 5.9 The cost of universal proficiency
- 5.10 The ground floor of the world
- 5.11 Diaspora buffers and regime relaxation
- 5.12 Deep heterogeneity
- 5.13 Democratic settlement

5.14 Fair resignation

## 6. LINGUISTIC DIVERSITY

6.1 What is diversity?.

6.2 What is linguistic diversity?

6.3 Multilingualism against linguistic diversity?

6.4 Local diversity versus inter-local diversity

6.5 Curse or treasure?

6.6 Economic solidarity, identification, and communication

6.7 Local diversity and solidarity

6.8 Inter-local diversity and solidarity: an unexpected alliance?

6.9 Inter-local diversity and solidarity: an undeniable tension

6.10 Real freedom for all versus parity of esteem

## CONCLUSION

Notes

Bibliography

Index

*Philippe Van Parijs* ne povis eviti Esperanton. Sed li spekulacias sen iu ajn faka bazo pri la eventuala estonteco de Esperanto, kiu laŭ li estas dubinda, ĉar post ĝia enkonduko malaperos la neŭtraleco kaj simpleco de la lingvo (p. 39-46).

## 3 El universitatoj

### 3.1 Universitata laboraĵo el Danio

Kvin studentinoj de la Universitato de Roskilde/Danio prezentis la suban magistran laboraĵon. Ili petis la konsilojn i.a. de Ileana Schrøder kaj Peter Weide:

*Diggelmann, Pascale Janine/Hetroy, Emeline Mylène Solange/ Hjermind, Astrid Lindgreen/Holm, Juliet Eline/ Jensen, Signe Marie (2012): Esperanto – a hopeless project? Roskilde University. Gvidanto: Hartmut Haberland, 97 p.*

La laboraĵo troviĝas en la reto: <http://rudar.ruc.dk/handle/1800/7516>.

### 3.2 Lingvoplanado kaj Planlingvoj ĉe la Universitato de Torino

En la akademia jaro 2011-2012 ekstarigis nova kurso ĉe Universitato de Torino, Italio, titole Lingvoplanado kaj Planlingvoj. La iniciato venis de *Federico Gobbo*, kiu konstatis, ke la grava Torina skolo pri Interlingvistiko, naskita en la komenco de la pasinta jarcento fare de la matematikisto *Giuseppe Peano*, kaj sekvata de la orientalistoj *Fabrizio A. Pennacchietti* fine de la pasinta jarcento kaj komence de la nuna, riskis formorti post la emeritiĝo de prof-ro Pennacchietti mem.

La novan kurson gvidis *Federico Gobbo*, kiu havas jam didaktikajn spertojn pri la temoj de lingvoplanado kaj planlingvoj, komence pro seminario ĉe Insubra Universitato, Varese (jam priskribita en IpI, 61-62, 2-3/2007) kaj poste pro laboratorio ĉe Universitato de Milano (jam priskribita en IpI, 74, 3/2010).

Ĉi-jare unuafoje la temoj estis konsiderataj indaj por plena kurso (36 horojn, 5 kreditunuojn) fare de la Fakultato pri Beletro kaj Filozofio, kondiĉe, ke la interlingvistika kaj esperantologia parto estu ligita al lingvoplanado kaj lingvo-politiko. Sponsoras la katedron la Itala Instituto de Esperanto, dum la posteno estas aljuĝita post publika konkurso ĉiun jaron.

(Laŭ informo de *Federico Gobbo*)

### 3.3 Promociado de *prof. LIU Haitao*

La konata ĉina lingvisto kaj interlingvisto, *prof. LIU Haitao*, estis nomumita “Qiushi Distinguished Scholar”, profesoro pri ĝenerala kaj aplika lingvistiko. Tio estas la sola posteno pri la fako en lia universitato, kio estas unu el la plej gravaj en Chinio (School of Presentation Art, Beijing Broadcasting Institute).

## 4 Progreso de UEA en la terminologia mondo

Kiel ni raportis pli frue (Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 440), UEA estis pasintjare (2011) akceptita kiel kunlaboranta organizaĵo en kvar subkomitatoj de la Teknika Komitato TC 37 (“Terminologio kaj aliaj lingvaj kaj enhavaj resursoj”) de Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO), kun kiu UEA havas oficialajn rilatojn ekde 1991.

Ĉi-jare, do en 2012, *Mélanie Maradan*, komisiito de UEA pri terminologiaj instancoj, transdonis peton de UEA pri asociiĝo ankaŭ al la nova, kvina subkomitato pri terminologiaj demandoj en la kampoj de *tradukado, interpretado kaj rilata teknologio* (TC 37/SC5). En la antaŭ nelonge finiĝinta voĉdonado, en kiu partoprenis 17 el la 21 voĉdonrajtaj membroj de tiu subkomitato, granda plimulto voĉdonis por la akcepto de UEA. Ĉar plenumiĝis ankaŭ la kondiĉo, ke Nederlando kiel la hejmlando de la kandidato, voĉdonis favore, la peto de UEA estis akceptita. UEA fariĝis la unua neregistara organizaĵo asociita al la subkomitato TC37/SC5, kies membroj estas naciaj normigaj instancoj.

Fine de junio 2012 *Mélanie Maradan* reprezentos UEA en la kunsidoj de la “granda” Teknika Komitato TC 37 kaj ties subkomitatoj okazantaj en Madrido.

En januaro 2012 UEA anoncis la eblecon por studentoj ricevi stipendion de UEA por partopreni trejnkurson pri terminologio, kiu okazos en julio en la Universitato de Vieno kun mondfamaj profesoroj pri terminologio kaj faka komunikado kiel instruistoj. El kvin kandidatoj la Estraro de UEA elektis por la trejnado *Olof Pettersson* el Svedio kaj *Alisa Nikitina* el Ukrainio.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, 454)

## 5 Persona bibliografio de *Věra Barandovská-Frank*

### 5.1 Biografieto

*Věra Barandovská-Frank* naskiĝis 17.8.1952 en Opava (Ĉeĥio). Post fino de gimnazio ŝi studis la lingvojn latina, franca kaj itala en la filozofia fakultato de Purkyně-Universitato en Brno. Tie ŝi magistriĝis en 1975, poste doktoriĝis pri historio de antikva literaturo (PhDr.) kaj pri klasika filologio (Dr.).

Ŝi habilitiĝis en 1994 pri interlingvistiko ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kie ŝi estas Aprof (asociita profesoro). Ŝi instruis en la Teknika Universitato Ostrava (Ĉeĥio) kaj en la Universitato Paderborn (Germanio).

*Věra Barandovská-Frank* ankaŭ estas honora profesoro de Blaga-Universitato en Sibiu (Rumanio), ekstera docento de Konstantin-Universitato en Nitra (SK) kaj de la Interlingvistikaj Studoj ĉe Mickiewicz-Universitato en Poznań (Pollando). Ŝi engaĝiĝas en la latinlingva movado (Latinitatis Vivae Provehendae Associatio). Ŝi estas aktiva membro de la germana Societo pri Interlingvistiko (GIL).

En la Instituto por Kibernetiko en Paderborn ŝi laboras kiel redaktorino de la revuo “Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft”. (Vidu en IpI 74 (p. 7-13) la liston de la interlingvistikaj materialoj, aperintaj en la menciita revuo). Al la jubileonta interlingvistino ni deziras sanon kaj feliĉon kaj ĝojos pri ŝia estonta scienca aktivado.

## 5.2 Publikaĵoj

La eldonejo de “Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik” (grkg/Humankybernetik) estas: Paderborn, Akademia Libroservo - Institut für Kybernetik e.V. Se la germanoj indikas la redaktorinon kiel “Herausgeber” (Hrsg., Hg.) ni nur mencias Red. (Redaktoro).

1. Planlingvoj el la vidpunkto de latinisto, *Scienca Informilo*, Budapeŝto 1978, p. 17 – 20.
2. Latinidaj planlingvoj. En: Blanke, Detlev (Red., 1979): *Esperanto. La internacia lingvo – sciencaj aspektoj*. Berlino: Kulturbund der DDR (Centra Laborrondo Esperanto). Vorträge eines Seminars in Ahrenshoop/DDR., p. 89 – 94.
3. Proposita Comeniana quae ad linguam internationalem pertinent. *Studia minora Universitatis Purkynianae* A27/1979, p. 235 – 242.
4. Interlingvistika verko de Komenio. In: Szerdahelyi, István (Red., 1980): *Miscellanea interlinguistica*. Budapeŝto: Tankönyvkiadó, p. 261 – 266.
5. Komenský a mezinárodní jazyk. *Cizí jazyky ve škole* 4/1982, p. 25 – 30.
6. Misto interlingvistiky v jazykovědě. *Studia minora universitatis Purkynianae* A32/1984, p. 103 – 108.
7. K mezinárodnímu roku komunikace. *Cizí jazyky ve škole* 2/1983, p. 57 – 58.
8. Kies estas interlingvistiko? En: Rokicki, Ryszard (Red., 1984): *Acta Interlinguistica*. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne. Rada Naczelna ZSO, p. 9 – 12.
9. Komenio kaj ideo de la internacia lingvo. En: Rokicki, Ryszard (Red., 1984): *Acta Interlinguistica*. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne. Rada Naczelna ZSO, p. 29 – 40.
10. Ĉu Esperanto latinecas? En: Košecký, Stanislav (Red. 1986): *Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko*, Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio, p. 5 – 12.
11. Recenzo de prelegkolektoj el Internacia seminario Nitra. *Informilo por Interlingvistoj*, Varsovio 1986, p. 3 – 6.
12. Interlingvistický seminář. *Cizí jazyky ve škole* 10/1988, p. 470 – 471.
13. Latinida ĥaraktero de internaciaj lingvoj. Prelegoj, Bratislavo: SAV, 1988.
14. *Esperanto pro samouky*. Praha: Státní pedagogické nakladatelství., 1989, ISBN 80-04-22907-7, 367 p.
15. Přínos IALA k problému jazykového plánování. En: Košecký, Stanislav (Red. 1990): *Problémy interlingvistiky II*. Bratislavo: Jazykovedný ústav L. Štúra Slovenskej akadémie vied. Slovenský esperantský zväz, p. 73 – 78.
16. Seminář československých interlingvistů. *Cizí jazyky ve škole* 1/1990, p. 45 – 46.
17. Internacia scienca akademio kaj internacia lingvo, *grkg/Humankybernetik* 4/1990, p. 155 – 158.
18. IALA, *grkg/Humankybernetik* 2/1991, p. 76 – 83.
19. Lernerleichterung durch sprachliche Vorschaltkurse, 4. kibernetika konferenco, Praha 1991, p. 42 -48 (kun Helmar Frank).
20. Kiel utile difini la nocion interlingvistiko. *grkg/Humankybernetik* 4/1991, p. 182 – 190. (kun Helmar Frank kaj Yashovardhan)
- (20). Represo en: *Filozofia revuo Simpozio*, 18/1991, p. 13 – 21.
21. Lernplifaciligilo pro antaŭmetitaj lingvokursoj, *Internacia Pedagogia Revuo* 4/1991, p. 11 – 15. (kun Helmar Frank) (Variaĵo de 19).
22. Komenio kaj la internacia lingvo, Internacia seminario pri Komenio, prelegmaterialo,

- Praha: CES ,1992. p. 5 – 11.
23. K problému cizojazyčné výuky na evropských školách. Nitra: MEDACTA, sborník Medacta , n. 4/1993, p. 325 – 328.
  24. Noto pri planlingvaj kriterioj kaj latina influo. *grkg/Humankybernetik* 2/1993, p. 88 – 92.
  25. Facilité d'apprentissage par les cours préparatoires. *Actes du 13e congrès de cybernétique Namur* 1992, Namur : Association internationale de cybernétique, 1993), p. 387 – 391.
  26. Methodus linguarum novissima. *Internacia Pedagogia Revuo* 1993/2. p. 1 – 7.
  27. Lingvistikaj meritoj de matematikisto: Peano kaj Latino sine flexione. *grkg/Humankybernetik* 3/1993, p. 119 – 124.
  28. Unterrichtssprache und Lernerfolg. Paderborn: Akademie Libroservo/Institut für Kybernetik Paderborn (Aktoj de la konferenco Berliner Mai) 1993, p. 102 – 105.
  29. Instrulingvo kaj lernsukceso. En: Krause, Manfred/Piotrowski, Siegfried (Red., 1993): *Bildungskybernetik und Europäische Kommunikation* . Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH, p. 102 – 105.
  30. Interlingvistika a kybernetická pedagogika při řešení problému mezinárodního dorozumění. *Technologia vzdelávania* 1994/5, p. 2 – 5.
  31. La latina kiel interlingvo kaj planlingvistika fonto. En: Carlevaro, Tazio (Red.,1994), *Premier Colloque d' Interlinguistique: CDELI - La Chaux-de-Fonds. 16. - 17. 4. 1994, Contributions*. Dubois, Bellinzona 1994, p. 25 – 35.
  32. Instrulingvo kaj lernsukceso (ŝanĝita teksto de 29), *grkg/Humankybernetik* 1994/2, p. 59 – 71.
  33. Novlatinidaj tendencoj en interlingvistiko. *Literatura Foiro* 1994/150, p.203 – 206.
  34. *Enkonduka lernolibro de interlingvistiko*. Sibiu: Editura Universitatii din Sibiu, 1995 ISBN 973-95604-6-8, 106 p.
  35. Lernolibro pri interlingvistiko *Internacia Pedagogia Revuo* 1995/1, p. 12 – 15.
  36. *La latina kiel interlingvo/Latein als internationale Sprache*. Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH , 1995, ISBN 80-85853-12-4,191 p..
  37. *Latina jako mezinárodní jazyk*. Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH,1995, ISBN 80-85853-13-2, 84 p..
  38. Postavení interlingvistiky v systému věd. *Technológia vzdelávania* 1995/5, p. 11 – 13, 1995/6, p. 9 – 11.
  39. *Úvod do interlingvistiky*, Slovaka Filio de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino Nitra 1995, ISBN 80-967425-0-7, 126 p.
  40. Ekzempla mezurado de lernprogresoj okaze de lernado de vokabloj, *grkg/Humankybernetik* 1996/37/1, p. 11 – 15.
  41. Versus interlinguistica/Aus der Geschichte der Interlinguistik. *grkg/Humankybernetik* 1996/37/2, p. 71 – 82.
  42. Eŭropa kalendaro, instruhelpilo ne nur por LOI (=Lingvo-orientiga instruado). *Internacia Pedagogia Revuo* 1996/3, p. 11 – 16.
  43. De symposio Latino Arimini habito. *Vox Latina* 1996/126, p. 591 – 592.
  44. La latina kiel interlingvo. *Informilo por interlingvistoj* 1997/1, p. 2 – 10.
  45. *Novinky v německém pravopisu*. ISBN 80-85853-33-7, Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH 1997,124 p..
  46. Erich Weferling: tri jardekoj da lingvofajlado. En: Carlevaro, Tazio (Red.,1998) : *Domaine de la recherche en linguistique appliquée. Contributions*. (Aktoj de la interlingvistika kolokvo en La Chaux-de-Fonds, 1. - 3.11. 1996). Bellinzona: Dubois, p. 196 – 210.
  47. International Academy of Science and International language. En: Hendrich, Josef., Procházka, Martin (Red., 1998): *Comenius ' heritage and Education of Man for the 21th century*. Praha: Karolinum, p. 135 – 142.
  48. Der neueste Stand der Lateinbewegung. En: Blanke, Detlev (Red. 1998): *Soziokulturelle*

- Aspekte von Plansprachen*. Interlinguistische Informationen. Beiheft 4. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 47 – 49.
49. Machbare Mehrsprachigkeit in Europa. *grkg/Humankybernetik* 39/1/1998, p. 36 – 40.
50. Kie estas lingvaj limoj de Eŭropo. *Informilo por interlingvistoj* 1998/2, p. 19 – 20.
51. Kontribuo al la politiko de internacia scienca komunikado. *Actes du 15e congres de cybernétique Namur* 1998 (aperis en 1999). Namur: Association internationale de cybernétique, p. 736 – 739.
52. Kontribuoj de interlingvistiko al la kibernetiko de homa komunikado. En : *Actes du 15e congres de cybernétique*. Namur: Association internationale de cybernétique 1998 (eld. 1999), p. 721 – 725.
53. Observata evoluigo de plurlingva terminologio en novaj interdisciplinaj fakoj. En : Malovec, Miroslav (Red., 1999): *Modernaj rimedoj de komunikado*, Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH, p. 97 – 109.
54. Beobachtungen bei der mehrsprachigen Terminologieentwicklung neuer interdisziplinärer Fachgebiete. En: Blanke, Detlev (Red., 1999): *Interlinguistik und Lexikographie*. Interlinguistische Informationen. Beiheft 5. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 63 – 70.
55. Nuntempaj latinaj verkistoj. *Literatura Foiro* 31/2000: Jan Novák: n-ro 183, p. 49-53, Geneviève Immé: n-ro 184, p. 80-86, Anna-Ilse Radke: n-ro 185, p. 145-148.
56. Flavius Josephus: Vero kaj mito pri paco kaj milito. En: Michela Lipari (Red., 2000): *Internacia Kongresa Universitato*, Rotterdam: UEA, p. 27 – 49.
- (56.) Represo en: *Acta Sanmarinensia* VI/2, Leins Verlag Göttingen, 27 p., 2004, ISBN 3-932975-17-0.
57. Europeistyka, nauka o nowej i starej Europie. En: Galor, Zbigniew/ Gorynska-Bittner, Barbara (Red., 2000): *Stara i Nowa Europa*, Poznań: Akademia Rolnicza, p. 61 – 77.
58. Forgesita panslavisma volapukisto. En: Fiedler, Sabine/ Liu, Haitao (Red., 2001): *Studoj pri interlingvistiko/Studien zur Interlinguistik. Festlibro por/Festschrift für Detlev Blanke*. Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH, p. 203 – 216.
59. Gibt es Europa? Was ist europäisch? En: Blanke, Detlev (Red., 2001): *Sprachenpolitik in Europa*. Interlinguistische Informationen, Beiheft 6. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 122 – 128.
60. Giuseppe Peano und Latino sine flexione. En: Blanke, Detlev (Red., 2001): *Zur Struktur der Planprachen*. Interlinguistische Informationen, Beiheft 7. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 6 – 29.
61. Eŭropaj lingvoj kaj interlingvoj. *grkg/Humankybernetik* 2001/42/4, p. 155 – 165.
- (61) Represo en: Joanna Lewoc (Red., 2008): *Interkomunikaj variacioj*. Göttingen: Leins Verlag, p. 89 – 102.
62. Die Zeitschrift ‚eŭropa dokumentaro‘ in den ersten fünf Abschnitten ihrer Existenz. En: Piotrowski; Siegfried/ Frank, Helmar (Red., 2002): *Europas Sprachlosigkeit*. München: KoPäd, p. 65 – 68.
63. Politique linguistique du Club européen. En : Piotrowski, Siegfried/ Frank, Helmar (Red., 2002): *Europas Sprachlosigkeit*, KoPäd München, p. 33-37.
64. Latein. Ein Überblick über eine moderne internationale Sprache. *Language Problems & Language Planning* (26)2/2002, p. 179 – 192.
65. Über die Academia pro Interlingua. En: Blanke, Detlev (Red., 2002): *Plansprachen und ihre Gemeinschaften*. Interlinguistische Informationen, Beiheft 8. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 6 – 21.
66. *De Latino sine flexione centenario/Ein Jahrhundert Latino sine flexione*. Paderborn: Akademia Libroservo 2003, ISBN 3-929853-14-0, 100 p.
67. Gehören Plansprachen zur Sprachplanung? *grkg/Humankybernetik* 44/2/2003, p. 88 – 99.
68. Archiv- und Werkstattseiten für Plansprachen im Internet. En: Blanke, Detlev (Red., 2003): *Plansprachen und elektronische Medien*. Interlinguistische Informationen, Beiheft

- 9, Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, p. 9 – 39.
69. Zur Typologie und Charakteristika der Universalsprachen. *grkg/Humankybernetik* 2004/43/3, p. 134-144
70. Plansprachen als Teil der Sprachplanung. En: Blanke, Detlev (Red., 2004): *Spracherfindung – Sprachplanung – Plansprachen. Interlinguistische Informationen, Beiheft 11*, Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 9 – 33.
71. 45 Jahre Grundlagenstudien. *grkg/Humankybernetik* 2004/45/4, p. 199 – 204.
72. Fabela Josef Vondroušek. En: Werner, Jan/Malovec, Miroslav/ Hršel, Zdenek (Red., 2005): *Verda duopo Vondroušek -Schreiber 1904-2004*, Kolekto de prelegoj prezentitaj en la konferenco okazinta en Brunno la 4.12.2004. Brno: Klub esperantistu, p.38 – 43.
73. Kion la eŭropanoj sciu pri eŭropaj lingvoj? En: Aleksander Duličenko (Red.,2005): *Interlinguistica Tartuensis VIII*, Tartu: Tartuskij universitet, p. 61 – 95.
74. Wozu conlangen die Conlangers? En: Rapp; Reinhard u.a. (Red., 2006): *Perspectives on Cognition*. Lengerich: Pabst Science Publishers , p. 279 – 291.
75. *Nový německý pravopis závazný od 1.8.2006* (kun Karin Schöne), Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH 2006, ISBN 80-85853-88-4, 143 p.
76. Akademioj, lingvoj kaj planlingvoj. En: Wandel, Amri (Red., 2006): Internacia kongresa universitato. 59-a sesio, Florenco, Italio, 29 julio – 5 aŭgusto 2006. Rotterdam: UEA, p. 15-39. Krome en: <http://uea.org/pdf/IKU2006.pdf>
77. Revuo Kosmoglott en interlingvistika fono. *grkg/Humankybernetik* 47/4/2006, p. 197 – 204.
78. Planlingvaj samtempuloj: Scienca gazeto kaj Schola et Vita. *Scienca Revuo* 3/2006, p. 153 – 176.
79. Internaciaj lingvoj en interreto. En: Borbone, Pier Giorgio/Mengozzi, Alessandro/ Tosco, Mauro (Red., 2006): *Loquentes linguis*, Wiesbaden: Harrassowitz, p. 51 – 62.
80. Rolo de Cosmoglotta por la stabiligo de Occidental. *grkg/Humankybernetik* 48/2/2007, p. 80 – 92.
81. Cosmoglotta survoje de Occidental al Interlingue. *grkg/Humankybernetik* 48/3/2007, p. 123 – 138.
82. Latein heute und im Netz. *Interlinguistische Informationen* 66-67 (1-2/08), p.10 – 13.
83. Cosmoglotta kaj Interlingue. *grkg/Humankybernetik* 49/2/2008. p. 98 – 111.
84. Linguistics in an interdisciplinary perspective - hobby linguistics. *Respectus philologicus* 13 (18) A 2008, p. 167 – 180.
85. Komunikado en fikciaj kulturoj/komunikace ve fiktivních kulturách. En: Tišljár, Zlatko (Red., 2008): *Interkultura dialogo kaj komunikado*. Maribor: Tiskarna Babič, Europa Esperanto Unio Bruselo, p. 8 – 17.
86. Omaĝe de centjariĝo de verko en Latino sine flexione. *grkg/Humankybernetik* 49/3/2008, p. 158 – 160.
87. *La plej famaj verkoj de Erasmo de Roterdamo*. AIS-kurso. [http://www.forst.wzw.tum.de/EXT/PUBL/quednau/Erasmus\\_BARAN.pdf](http://www.forst.wzw.tum.de/EXT/PUBL/quednau/Erasmus_BARAN.pdf)
88. Esperanto-fakartikoloj en “Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft”. En: Pluhař, Zdenek (Red., 2009): *Esperanto, instrumento de fakuloj*. Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH p. 92 – 104.
89. Kiel planlingvoj povas helpi la sciencon? *Teleskopo-Internacia Scienca revuo*, Unua eldono 2009, [www.teleskopo.com](http://www.teleskopo.com), ISSN 1984-7874. 12 p.
90. Praesperanto – la planlingva Ossian. En: Koutny, Iona (Red., 2009): *Abunda Fonto. Memorlibro Omaĝe al Prof. István Szerdahelyi*. Poznań: ProDruk, p. 65 – 76.
91. Korrelativa in Esperanto und in einigen indogermanischen Sprachen. En: Fiedler, Sabine (Red. 2009): *Esperanto und andere Sprachen im Vergleich*. Interlinguistische Informationen, Beiheft 16. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 99 – 115.
92. Bonvena kontribuaĵo al historio de interlingvistiko kaj matematiko. Recenzo. *grkg/Humankybernetik* 50/3/2009, p. 169-170.

93. Interreta lingvokreado kaj interlingvistiko. *grkg/Humankybernetik* 50/3/2009. p. 151 – 168
94. Latinidoj por Eŭropo. En: Duliĉenko, Aleksandr (Hrsg., 2009): *Interlinguistica Tartuensis IX*, Tartu: Tartuskij universitet, p. 83 – 102.
95. Europa Klub 1974-2009. *grkg/Humankybernetik* 50/4/2009, p. 195 – 200.
96. Projektoj de Eŭropa Klubo: Lingvoorientiga instruado kaj eŭropa kalendaro. *grkg/Humankybernetik* 50/4/2009, p. 210 – 214.
97. Arto inter lingvo kaj literaturo. En: Blanke, Detlev/ Lins, Ulrich (Red. 2010): *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: UEA, p.209 – 222.
98. Interlinguistische Beiträge in „grkg/Humankybernetik“. *Interlinguistische Informationen*, 2010/74/1, p. 10 – 16.
99. *Latinidaj planlingvoj*. Akademia Libroservo Paderborn 2010. 49 p. ISBN 3-929853-17-5.
100. Publikaĵoj de AIS-anoj. Recenzo. *grkg/Humankybernetik* 2010/51/4, p. 191 – 192.
101. “La arto labori kune”. Recenzo. *grkg/Humankybernetik* 2011/52/2, p. 98 – 99.
102. Panslawische Variationen. En: Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (Red., 2011): *Florilegium Interlinguisticum. Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag*. Frankfurt am Main etc.: Peter Lang, p. 209 – 236.
103. Dialogo kaj interkompreno en interlingvistika verko de Otto Jespersen. En: Wandel, Amri (Red., 2011): *Internacia Kongresa Universitato, 64-a sesio*, Kopenhago. Rotterdam: UEA, p. 84 – 120.  
Rete sub <http://w3.forst.wzw.tum.de/~quednau/VBF/Jespersen.pdf>
104. Interlingvistiko centjara. *grkg/Humankybernetik* 2011/52/3, p. 134 – 146.
105. Novaj publikaĵoj. Recenzo. *grkg/Humankybernetik* 2011/52/3, p. 147 – 148.
106. Spracherfindung und Nationalsprache. Beispiel il Glheth Talossan. En: Fiedler, Sabine (Red, 2011.): *Spracherfindung und ihre Ziele*. Interlinguistische Informationen, Beiheft 18. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 33 – 49.
107. Lingvopolitiko kaj interlingvistiko de Ladislav Podmele. En: Duliĉenko, Alexander (Hrsg.), *Interlinguistica Tartuensis X*, Tartu: Tartuskij universitet (en preparo)

## 6 Nova prezidanto de *Esperanto Studies Foundation* (ESF)

Kadre de planita transiro *Humphrey Tonkin* emeritiĝis de la ESF-prezidanteco dum kunsido de la ESF-estraro en aprilo 2012. La Estraro unuanime aprobis Vic-prezidanton *Mark Fettes* kiel lian posteulon.

Tonkin, 72, estis apartenis al la unuaj prezidantj de la Fondaĵo (fondiĝo en 1968).

Aliaj ŝanĝiĝoj en la Estraro: *Derek Roff* elektiĝis Vic-prezidanto, aliĝante al jama Vic-prezidanto *Grant Goodall*. *Anna Bennett* kaj *Bonnie Fonseca-Greber* restas en la Estraro kiel Kasisto kaj Sekretario respektive, kune kun estraranoj *Geoffrey Greatrex* kaj *Wally Du Temple*. *Timothy Reagan*, iama Ekzekutiva Direktoro de ESF, forlasas la Estraron pro lia baldaŭa transloĝiĝo al Kazahio, kie li servos kiel Dekano de nova postdiploma lernejo pri edukado en la universitato Nazarbajev. Reagan tamen daŭre servos kiel membro de la ESF-konsilantaro.

---

**Eldonas:** Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, [detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de). Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ KD. Artikoloj sen aparta indiko pri aŭtoreco kutime estas kompilitaj de la redaktoro. Represo kun fontindiko estas permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. IpI riceveblas laŭpete senpage de CO de UEA .